**PILO-PRESS**
Internacia
Informservo

N-ro 31/1974 3 sep 1974
Aperas ĉiusemajne

Glumarko pri la 53a Germana Esperanto-Kongreso Oberkirch 1975

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

## 85 jarojn Esperanto-gazetaro

Nürnberg (pp) Antaŭ 85 jaroj, la 1an de septembro 1889, aperis en Nürnberg la unua Esperanto-revuo de la mondo, La Esperantisto. Por la 85jara Esperanto-gazetaro la problemoj estas preskaŭ la samaj kiel en la unua tempo: manko de sufiĉaj abonantoj, financaj zorgoj kaj redaktaj problemoj.

El multaj revuoj ekestis nur informiloj kaj bultenoj kaj aliaj revuoj malaperis. Fakte ekzistas nur tre malmultaj publikaĵoj, kiuj meritas la nomon revuo aŭ gazeto.

Estas ankaŭ tendenco anstataŭi Esperantlingvan revuon per nacilingva eldonaĵo kiel montras la hungara ekzemplo "Eszperantó magazin", kiu aperas en eldonkvanto de 10 000 ekzempleroj. La avantaĝo de tiu relative granda eldonkvanto estas, ke tiu revuo ricevas pagitajn anoncojn de hungaraj firmaoj, tamen restas la zorgo trovi la aĉetantojn kaj legantojn por la gazeto.

Al modela informilo laŭ loka nivelo evoluis la "Budapeŝta Informilo", kiu ankaŭ sukcesis reklamigi hungarajn firmaojn (vidu la dorsan flankon de ĉi tiu numero!)

Tiu informilo distingiĝas per akurateco kaj reguleco. Ĵus atingis nin la septembra numero kun raporto pri la UK en Hamburgo kaj multaj aliaj interesaj informoj. El la UK-raporto ni citas: "Dum la tuta kongresa semajno escepte la noktmezajn horojn ĉiuhore okazis kunvenoj kaj prelegoj, diversaj laborkunsidoj, la diligenta kolegaro eĉ manĝi ne havis tempon. En la unua parto de la semajno la diskutoj estis tro akraj, pli akraj ol kutime, okazis ofendaj disputoj eĉ kalumnioj, sed de tago al tago, alproksimiĝante la oficialan fermon revenis kompreno kaj konsento."




LA HUNGARLANDA ESPERANTO-GAZETARO

BUDAPEŜTA INFORMILO

A Magyar Eszperantó Szövetség Budapesti Területi Bizottságának eszperantó nyelvű havi tájékostatója, kisárólag tagok és eszperantó szervezetek részére.
H-1443 Budapest. Poŝtkesto: 153. Nyilvántartási szám: 8-684/974.
Összeállitotta: Ságvári Ágnes, Készült a Boy Szolgálat nyomdájában.

## D-ro Werner Bormann ĉe Pola Radio

Varsovio (pp) Laŭ informo de Pola Radio D-ro Werner Bormann, vicprezidanto de UEA kaj prezidanto de Germana Esperanto-Asocio, kaj lia edzino, estis akceptita de la direktoro de Pola Radio por Eksterlando, Witold Skrapalak, por kelkhora interparolado , kiun ĉeestis ankaŭ la estro de la Esperanto-redakcio, Jan Klimek. D-ro Werner Bormann informis la direktoron pri la rezultoj de la 59a Universala Kongreso de Esperanto, kaj direktoro Skrapalak raportis pri la agado de la Esperanto-Redakcio de Pola Radio.

Ges-roj Bormann nuntempe partoprenas la 10an Internacian Feriosemajnon "Ora Pola Aŭtuno" en Miedzegorze.

## Esperanto-Laŭreatoj en Pollando

Varsovio. (pp). Lucien Giloteaux, Francio, kaj Werner Pfennig, GDR, nuntempe partoprenas senpagan ekskurson tra Pollando, kiel laŭreatoj el la konkursoj de la Esperanto-redakcio de Pola Radio. Pri siaj unuaj impresoj ili jam rakontis antaŭ la gastmikrofono de la Esperanto-redakcio.

## Prof. D-ro Frank ĉe SICOB-ekspozicio

Parizo (pp/hb) De la 18 - 27 sep 1974 okazos en Parizo en la grandaj foiraj haloj de Independence ĉe Neuilly la fama SCIOB-ekspozicio pri informatiko. Dum la ekspozicio la firmao Navarin S.A. montras la novan instru-aŭtomaton Robbimat-2-Kybernet, kiun evoluigis prof. d-ro Helmar Frank, la verkinto de la famaj "Tezoj pri la germana lingvopolitiko".

Dum la ekspozicia tempo la Robbimat-o estas daŭre funkcianta, kaj ĝi prezentos enkondukan programon pri Esperanto kun lumbildoj. Dum 2 tagoj (dimanĉo/lundo, 22 kaj 23 sep 74) profesoro Frank mem estos en la stando de Navarin. Li cetere ne nur parolas la francan, sed ankaŭ Esperanton sufiĉe perfekte!

## Esperanto en la radio

Varsovio (pp) Preskaŭ ĉiutage fine de la novaĵbulteno esperantistoj nun povas aŭskulti al plej freŝaj kaj aktualaj informoj el la Esperanto-movado. Dum la pasintaj tagoj ni konstatis jenajn informojn: D-ro Werner Bormann kaj lia edzino en Pollando, Alveno de Esperanto-laŭreatoj en Pollandoj, komenciĝo de la 10a Feriosemajno "Ora Pola Aŭtuno", Nova direktoro honorofica por CED, novaj eldonoj de Pilo-Press k.a. Do, valoras ĉiutage la tri elsendojn de Pola Radio aŭskulti. Vi estas informataj ĉiutage ne nur pri la gravaj okazintaĵoj en la mondo kaj en Pollando, sed ankaŭ el la Esperanto-movado. Pola Radio donas unikan servo al esperantistoj! Utiligu tiun senpagan servon!

Sed vi povas kunhelpi plivastigi tiun servon, se vi skribas de tempo al tempo poŝtkarton aŭ leteron al la redakcio kun viaj komentoj, kritikoj aŭ laŭdoj.

Partoprenu la konkursojn de Pola Radio. Nun estas okazo partopreni specialan konkurson de la Esperanto-Redakcio. Vi nur devas respondi al unu el la du demandoj:

1) Kiun el la disaŭdigoj de la Pola Radio vi aŭskultas plej ofte kaj kial?

2) Kiajn rimarkojn vi havas koncerne niajn antenajn programerojn en Esperanto?

Sendu viajn respondojn ĝis la 30 okt 1974 al POLA RADIO, Esperanto-Redakcio, P.O. Box 46, PL-00-950 Warszawa 1, Pollando!

**Tagebuch**

25. August

Die Mainzer Heinzelmännchen haben eine eigene Sprache, eine Art Gezwitscher, ein Idiom, das es in Wirklichkeit nicht gibt. Mich fasziniert diese Zwergensprache, ein geheimnisvolles Esperanto überirdischer Wesen. RK

La lingvo de "Mainzelmännchen"

Frankfurt/M (pp) "Mainzelmännchen" estas la koboldoj de la Dua Germana Televidprogramo (ZDF). Gloso en Frankfurter Neue Presse de la 26.8.74 frontpaĝe okupis sin pri la lingvo de tiuj koboldoj kaj konkludas: " Fascinas min tiu lingvo de gnomoj, mistera Esperanto de superteraj estaĵoj".

Tuja gazeta reago

Nürnberg. (pp) Jam unu tagon post apero de germanlingva informilo de Pilo-Press "Esperanto-Nachrichten-Dienst" kun la informo de fondo de Internacia Rondo de "Amikoj de Esperanta Literaturo kaj Kulturo" fare de Libroservo Pickel Nürnberg germanaj gazetoj publikiĝis sur la kultura parto la informon kiel montras la du eltranĉaĵoj:

**Nürnberg: Esperanto-Buchgemeinschaft gegründet**

# Taugenichts = „Sentaugulo"

**Ein internationaler Kreis der „Freunde der Literatur und Kultur in Esperanto" ist in Nürnberg ins Leben gerufen worden.**

Die Vereinigung unter Leitung von Ludwig Pickel hat sich zum Ziel gesetzt, die Literatur und Kultur in Esperanto in Form einer Esperanto-Buchgemeinschaft unter den Esperantisten in aller Welt, aber auch in der Öffentlichkeit populär zu machen.

Die Mitglieder des Kreises erhalten vierteljährlich ein Literaturblatt mit den neuesten Titeln. Die erste Ausgabe enthält ein Angebot von mehr als 40 Neuerscheinungen. Bestseller auf dem Esperanto-Buchmarkt sind derzeit die amourösen Geschichten aus dem „Leben eines bervalesischen Taugenichts" mit dem Esperanto-Titel „El la vivo de bervala sentaugulo". AZ

Supre: Abendzeitung, Nürnberg, 6.9.74
Dekstre: Nürnberger Zeitung, Nürnberg 6.9.74
Krome informis dpa Nürnberg per teleskribilo!

**Literaturblatt in Esperanto**

Unter der Leitung von Ludwig Pickel ist in Nürnberg ein „Internationaler Kreis der Freunde der Literatur und Kultur in Esperanto" gegründet worden, der mit einer Esperanto-Buchgemeinschaft die Esperantisten in aller Welt erreichen und das Esperanto auch in der Öffentlichkeit populär machen will. Die Mitglieder des Kreises erhalten vierteljährlich ein Literaturblatt mit den neuesten Titeln. Die erste Ausgabe enthält ein Angebot von mehr als vierzig Neuerscheinungen, das von Rhetorik über Kochkunst bis zum Weltatlas in Esperanto reicht. Nürnberg ist Sitz des Deutschen Esperanto-Bundes.

Kongresa numero de Heroldo de Esperanto

Bruselo (pp) En la unuaj tagoj de septembro eliris la kongresa numero de la populara revuo "Heroldo de Esperanto" sub la dato 1.9.74. Sur 8 paĝoj Heroldo ĉefe raportas pri la UK en Hamburgo. La titolpaĝo portas jenan surskribon:

1650 kongresanoj sen interpretistoj en Hamburgo

D-ro H. Tonkin nova prezidanto de UEA

Nova estraro elektita - Rezolucioj por neŭtraleco, pri naciismo kaj kontraŭ rasaj diskriminacioj - Pli ol 100 kongresaj programoj.

La abonprezo de Heroldo de Esperanto estas ekde la 1975a jaro 25,- GM. Novaj abonantoj povas aboni laŭ la malnova tarifo de 23,- GM kaj ricevas senpage la restajn numerojn de 1974 ekde la pago de la abonkotizo. Abonu ĉe Ludwig Pickel, Libroservo, 85 Nürnberg 1, Postfach 2113.

**************

Novaj eldonaĵoj:

Post tri semajnoj estos haveblaj glumarkoj pri la 53a Germana Esperanto-Kongreso en Oberkirch 1975, dukoloraj, 10 glumarkoj sur 1 folio kostas inkl. afranko 1,- DM. 5 folioj kostas 3,50 DM kaj 10 folioj kostas 5,50 DM. Mendu ĉe L. Pickel, Nürnberg!




Pilo-Press: Informservo ĉiusemajna en Esperanto, jara abonkotizo 30,-DM
Novaj abonantoj por 1975 ricevas senpage la restajn numerojn de 1974
Pagu al Ludwig Pickel, 85 Nürnberg 1, Postfach 2113, Postscheckkonto
Nürnberg 819 56-851